

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

EL NIA MUZEO

La Unua Etaĝo

La unua etaĝo de la muzeo, kun la nomo Zamenhof, havas relative vastan ekspozician spacon, utiligeblan ankaŭ kiel kunvenejon.

La parto tuj ĉe la enirpordo estas nomata Ludoviko Zamenhof. En septembro, ĝi rolas ĉefe kiel la ekspoziciejo pri libroj kaj broŝuroj koncerne atombombadon (pri tio legu en nia antaŭa numero).

La pli interna parto estas nomata Klara Zamenhof. Tie nun estas precipe 2 librobretoj.

Foto 1 montras “breton por vendado”. Tie ni aranĝas vendeblan stokon de libroj – lernolibroj, vortaroj, informlibroj kaj aliaj pri Esperanto. Tie ankaŭ estas vendataj libroj eldonitaj de ni.

Foto 2 montras “breton por vasta konigo de Esperanto”. Tie oni ekspozicias i.a. tradukon de famaj literaturaĵoj aŭ komiksoj, por informi, ke tiaj kaj tiaj eldonaĵoj aperis en Esperantujo.

Konektita parte al tiu ĉi Klara Zamenhof estas nomata Zofia Zamenhof, t.e. kuirejo. Ĉar nia Muzeo antaŭe estis ordinara loĝdomo por familio, ĝi nepre havas kuirejon. Sed ni ne kuiras. Ni havas nur kafmaŝinon, elektronan fornelon kaj malgrandan fridujon. Malantaŭ tiu ĉambro troviĝas ĉambreto nomata Adam Zamenhof, fakte iama banĉambro. Ni ne uzas banejon, sed ni utiligas vestoŝanĝan spacon kiel tenejon.



Foto 1



Foto 2

Profesia uzado?

Ni ricevis vizit-oferton de studanto pri historio, por serĉi materialon ĉi tie. Ni kompreneble akceptis la proponon, sed la kronvira situacio ne ebligis, ke li vizitos eksteran instancon. Ni esperas, ke post la pandemio, li vizitos nin.

Alia vizito plenumita estis vizito de J-MENT, produktanto de komputilaj ludoj, i.a. Amrilato. Li serĉis materialon por sia nova ludplano. Ni esperas ke la vizito ja iluminis lian vojon.

Nekrologo

S-ino AIDA Yayoi, 85-jara (1936-04-01 / 2021-07-30)

Pro malsano forpasis s-ino Aida Yayoi, multjara membro kaj la iama Prezidanto (2010 kaj 2011) de Jokohama Esperanto-Rondo (antaŭiranto de la nuna Esperanto Jokohama).

Kiel literatura amanto, ŝi estas konata kiel tradukinto de “Sur sanga tero” de Julio Baghy en la japanan. En la n-ro 364 de “Novaĵoj Tamtamas” aperis ŝia eseo: “Homoj kiujn mi renkontis en mia matena promenado”.



eĥoj tutmondaj

el Aŭstralia Radio ZZZ

Koran dankon pro la sendado de la julia numero de Novaĵoj Tamtamas. Mi plie deziras multe da vizitantoj al via muzeo; aparte ne-esperantistoj, kiuj povos tiumaniere ekscii pri la valoro de Esperanto.

Je la momento ni eĉ ne povas pensi pri vojaĝo pro la endomigo - la kvara en mia ŝtato Viktorio-decidita de la ŝtata registaro por provi haltigi la disvastigon de la delta versio de koronaviruso .

Amikajn salutojn, Franciska

el Uzbekistano

Estimataj jokohamanoj, karaj japanaj geamikoj!

El leginda viaronda bulteno “Novaĵoj Tamtamas” mi ĝoje informiĝis pri fondiĝo de Esperanto-Muzeo Jokohama.

Akceptu miajn elkorajn gratulojn okaze de tiu ĉi imitinda iniciato kaj vere grava evento en vialanda Esperantujo.

Mi volus aparte emfazi, ke speciale gravegas la fakto, ke via muzeo hejmas en la konstruaĵo, kiu estas propra posedaĵo de NPO Esperanto Jokohama. Laŭ mia persona sperto, tio multrilate povus ebligi kaj iusence garantii kontinuan, senprobleman kaj daŭripovan funkciadon de la nova E-establo.

Mi deziras al vi kaj al ĉiuj prizorgantoj de la E-muzeo fervoron, energion, paciencon, optimismon kaj pluan harmonian fruktodonan

laboron por Esperanto!

Fartu bone kaj havu abundajn sukcesojn surtere de konservado kaj pluevoluigado de esperantistaj kulturaj valoroj, kiuj estas nedisigebla parto de la monda heredaĵo de homaro!

Mi kredas, ke via muzeo povus fariĝi unu el la imponaj E-vidindaĵoj en Japanio kaj internaciskale, vizitindaj ankaŭ fare de ekstermovadanoj.

Geografie malproksime, sed amike ĉiam proksime, Anatolij Ionesov

el Singapuro

telfero en Singapuro

Mi legis la plej novan eldonon de la “Novaĵoj Tamtamas”. Tie mi vidis ke vi en Jokohama havas telferon. En Singapuro ankaŭ estas Telfero kio ligas vendejan centron je la marbordo kun insulo Sentosa (je unu flanko) kaj la monto Faber (je alia flanko). Tiu monto havas altecon de 105 metrojn. Sur Sentosa estas dua linio de la telfero.

La plej alta monto de Singapuro estas Bukit Timah Monto, ĝia alteco estas 163 metrojn. Ĝi eĉ havas Esperanto-lingvan paĝon:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Bukit_Timah

La Japanlingva versiono havas pli da informoj. Pri Monto Faber (“Mount Faber”) ekzistas nur Angla-lingva paĝo de Wikipedia.

Multajn salutojn sendas, Frank Stephan